
Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft

Akademia Libroservo/IfK
Kleinenberger Weg 16 B
D-33100 Paderborn

Die Humankybernetik (Anthropokybernetik) umfasst alle jene Wissenschaftszweige, welche nach dem Vorbild der neuzeitlichen Naturwissenshaften versuchen, Gegenstände, die bisher ausschließlich mit geisteswissenschaftlichen Methoden bearbeitet wurden, auf Modelle abzubilden und mathematisch zu analysieren. Zu den Zweigen der Humankybernetik gehören vor allem die Informationspsychologie (einschließlich der Kognitionsforschung, der Theorie über „künstliche Intelligenz" und der modellierenden Psychopathometrie und Geriatrie), die Informationsästhetik und die kybernetische Pädagogik, aber auch die Sprachkybernetik (einschließlich der Textstatistik, der mathematischen Linguistik und der konstruktiven Interlinguistik) sowie die Wirtschafts-, Sozial- und Rechtskybernetik. – Neben diesem ihrem hauptsächlichen Themenbereich pflegen die GrKG/Humankybernetik durch gelegentliche Übersichtsbeiträge und interdisziplinär interessierende Originalarbeiten auch die drei anderen Bereiche der kybernetischen Wissenschaft: die Biokybernetik, die Ingenieurkybernetik und die Allgemeine Kybernetik (Strukturtheorie informationeller Gegenstände). Nicht zuletzt wird auch metakybernetischen Themen Raum gegeben: nicht nur der Philosophie und Geschichte der Kybernetik, sondern auch der auf kybernetische Inhalte bezognenen Pädagogik und Literaturwissenschaft.

La prihoma kibernetiko (antropokibernetiko) inkluzivas ĉiujn tiajn sciencobranĉojn, kiuj imitante la novepokan natursciencon, klopodas bildigi per modeloj kaj analizi matematike objektojn ĝis nun pritraktitajn ekskluzive per kulturscienceaj metodoj. Apatenas al la branĉaro de la antropokibernetiko ĉefe la kibernetika psikologio (inkluzive la ekkon-esploron, la teoriojn pri "artefarita intelekto" kaj la modeligajn psikopatometrion kaj geriatrion), la kibernetika estetiko kaj la kibernetika pedagogio, sed ankaŭ la lingvokibernetiko (inkluzive la tekststatistikon, la matematikan lingvistikon kaj la konstruan interlingvistikon) same kiel la kibernetika ekonomio, la socikibernetiko kaj la jurkibernetiko. – Krom tiu ĉi sia ĉefa temaro per superrigardaj artikoloj kaj interfake interesigaj originalaj laboroj GrKG/HUMANKYBERNETIK flegas okaze ankaŭ la tri aliajn kampojn de la kibernetika scienco: la biokibernetikon, la inĝenierkibernetikon kaj la ĝeneralan kibernetikon (strukturteorion de informecaj objektoj). Ne lastavice trovas lokon ankaŭ metakibernetikaj temoj: ne nur la filozofio kaj historio de la kibernetiko, sed ankaŭ la pedagogio kaj literaturscienco de kibernetikaj sciajoj.

Cybernetics of Social Systems comprises al those branches of science which apply mathematical models and methods of analysis to matters which had previously been the exclusive domain of the humanities. Above all this includes *information psychology* (including theories of cognition and 'artificial intelligence' as well as psychopathometrics and geriatrics*), aesthetics of information* and cybernetic *educational theory, cybernetic linguistics* (including text-statistics, mathematical linguistics and constructive interlinguistics) as well as *economic*, *social* and *juridical cybernetics*. – In addition to its principal areas of interest, the *GrKG/HUMANKYBERNETIK* offers a forum for the publication of articles of a general nature in three other fields: *biocybernetics, cybernetic engineering* and *general cybernetics* (theory of informational structure). There is also room for *metacybernetic* subjects: not just the history and philosophy of cybernetics but also cybernetic approaches to education and literature are welcome.

La cybernétique sociale contient tous le branches scientifiques, qui cherchent à imiter les sciences naturelles modernes en projetant sur des modèles et en analysant de manière mathématique des objets, qui étaient traités auparavant exclusivement par des méthodes des sciences culturelles („idéographiques"). Parmi les branches de la cybernétique sociale il y a en premier lieu la psychologie informationelle (inclues la recherche de la cognition, les théories de l'intelligence artificielle et la psychopathométrie et gériatrie modeliste), l'esthétique informationelle et la pédagogie cybernétique, mais aussi la cybernétique linguistique (inclues la statistique de textes, la linguistique mathématique et l'interlinguistique constructive) ainsi que la cybernétique en économie, sociologie et jurisprudence. En plus de ces principaux centres d'intérêt la revue GrKG/HUMANKYBERNETIK s'occupe – par quelques articles de synthèse et des travaux originaux d'intérêt interdisciplinaire – également des trois autres champs de la science cybernétique : la biocybernétque, la cybernétique de l'ingenieur et la cybernétique générale (théorie des structures des objets informationels). Une place est également accordée aux sujets métacybernétiques mineurs: la philosophie et l'histoire de la cybernétique mais aussi la pédagogie dans la mesure où elle concerne cybernétique.

ISSN 0723-4899


Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft

Internationale Zeitschrift für Modellierung und Mathematisierung in den Humanwissenschaften
Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj
International Review for Modelling and Application of Mathematics in Humanities
Revue internationale pour l'application des modèles et de la mathématique en sciences humaines
Rivista internazionale per la modellizzazione matematica delle scienze umane



Inhalt * Enhavo * Contents * Sommaire * Indice

Band 53 * Heft 1 * März. 2012



Schriftleitung ***Redakcio*** **Editorial Board** ***Rédaction*** **Comitato di redazione**

Prof.Dr.habil. Helmar G.FRANK
O.Univ.Prof.Dr.med. Bernhard MITTERAUER
Prof.Dr.habil. Horst VÖLZ
Prof.Dr. Manfred WETTLER

Institut für Kybernetik, Kleinenberger Weg 16 B, D-33100 Paderborn, Tel.: (0049-/0)5251-64200
Fax: (0049-/0)5251-8771101 Email: vera.barandovska@uni-paderborn.de

Redaktionsstab ***Redakcia Stabo*** **Editorial Staff** ***Equipe rédactionelle*** **Segreteria di redazione**
Dr. Věra BARANDOVSKÁ-FRANK, Paderborn (deĵoranta redaktorino) - Mag. YASHOVARDHAN, Menden (for articles from English speaking countries) - Prof.Dr. Robert VALLÉE, Paris (pour les articles venant des pays francophones) - Prof.Dott. Carlo MINNAJA, Padova (per gli articoli italiani) - Prof. Dr. Inĝ. LIU Haitao, Hangzhou (hejmpaĝo de grkg) - Bärbel EHMKE, Paderborn (Typographie)

Internationaler Beirat
Internacia konsilantaro
International Board of Advisors
Conseil international
Consiglio scientifico

Prof. Kurd ALSLEBEN, Hochschule für bildende Künste Hamburg (D) - Prof.Dr. AN Wenzhu, Pedagogia Universitato Beijing (CHN) - Prof.Dr. Hellmuth BENESCH, Universität Mainz (D) - Prof.Dr. Gary W. BOYD, Concordia University Montreal (CND) - Prof.Dr.habil. Joachim DIETZE, Martin-Luther-Universität Halle/Saale (D) - Prof.Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER, Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino (RSM) - Prof.Dr. Herbert W. FRANKE, Akademie der bildenden Künste, München (D) - Prof.Dr. Vernon S. GERLACH, Arizona State University, Tempe (USA) - Prof.Dr. Klaus-Dieter GRAF, Freie Universität Berlin (D) - Prof.Dr. Rul GUNZENHÄUSER, Universität Stuttgart (D) - Prof.Dr.Dr. Ernest W.B. HESS-LÜTTICH, Universität Bern (CH) - Prof.Dr. René HIRSIG, Universität Zürich (CH) - Dr. Klaus KARL, Dresden (D) - Prof.Dr. Guido KEMPTER, Fachhochschule Vorarlberg Dornbirn (A) - Prof.Dr. Joachim KNAPE, Universität Tübingen (D) - Prof.Dr. Jürgen KRAUSE, Universität Koblenz-Landau (D) - Univ.Prof.Dr. Karl LEIDLMAIR, Universität Innsbruck (A) - Prof.Dr. Klaus MERTEN, Universität Münster (D) - AProf.Dr.habil. Eva POLÁKOVÁ, Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino (RSM) - Prof.Dr. Jonathan POOL, University of Washington, Seattle (USA) - Prof.Dr. Roland POSNER, Technische Universität Berlin (D) - Prof. Harald RIEDEL, Technische Universität Berlin (D) - Prof.Dr. Osvaldo SANGIORGI, Universitato São Paulo (BR) - Prof.Dr. Wolfgang SCHMID, Universität Flensburg (D) - Prof.Dr. Renate SCHULZ-ZANDER, Universität Dortmund (D) - Prof.Dr. Reinhard SELTEN, Universität Bonn (D) - Prof.Dr. Klaus WELTNER, Universität Frankfurt (D) und Universität Salvador/Bahia (BR) – PD Dr.Dr. Arno WARZEL, Hannover (D) - Prof.Dr.Dr.E.h. Eugen-Georg WOSCHNI, Dresden (D).

Die GRUNDLAGENSTUDIEN AUS KYBERNETIK UND GEISTESWISSENSCHAFT

(grkg/Humankybernetik) wurden 1960 durch Max BENSE, Gerhard EICHHORN und Helmar FRANK begründet. Sie publizieren regelmäßig die offiziellen Mitteilungen folgender wissenschaftlicher Einrichtungen:

TAKIS - Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko
(prezidanto: OProf.Dr.habil. Eva Poláková, Nitra, SK)

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) San Marino
(prezidanto: OProf. Dr. Hans Michael Maitzen, Wien)

Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft

Internationale Zeitschrift für Modellierung und Mathematisierung in den Humanwissenschaften
Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj
International Review for Modelling and Application of Mathematics in Humanities
Revue internationale pour l'application des modèles et de la mathématique en sciences humaines
Rivista internazionale per la modellizzazione matematica delle scienze umane



HUMANKYBERNETIK

Inhalt * Enhavo * Contents * Sommaire * Indice **Band 53 * Heft 1 * März. 2012**



Akademia Libroservo

Schriftleitung ***Redakcio*** **Editorial Board** ***Rédaction*** **Comitato di Redazione**

Prof.Dr.Helmar G.FRANK
O.Univ.Prof.Dr.med. Bernhard MITTERAUER
Prof.Dr.habil. Horst VÖLZ
Prof.Dr.Manfred WETTLER

Institut für Kybernetik, Kleinenberger Weg 16 B, D-33100 Paderborn, Tel.:(0049-/0)5251-64200, Fax: -8771101
Email: vera.barandovska@uni-paderborn.de

Redaktionsstab ***Redakcia Stabo*** **Editorial Staff** ***Equipe rédactionelle*** **Segreteria di redazione**
Dr. Věra BARANDOVSKÁ-FRANK, Paderborn (deĵoranta redaktorino) - Mag. YASHOVARDHAN, Menden (for articles from English speaking countries) - Prof.Dr. Robert VALLÉE, Paris (pour les articles venant des pays francophones) - Prof.Dott. Carlo MINNAJA, Padova (per gli articoli italiani) - Prof. Dr. Inĝ. LIU Haitao, Hangzhou (hejmpaĝo de grkg) - Bärbel EHMKE, Paderborn (Typographie)

Verlag und Anzeigenverwaltung **Eldonejo kaj anoncadministrejo** **Publisher and advertisement administrator** **Edition et administration des annonces**



Akademia Libroservo /
IfK GmbH – Berlin & Paderborn
Gesamtherstellung: **IfK GmbH**
Verlagsabteilung: Kleinenberger Weg 16 B, D-33100 Paderborn,
Telefon (0049-/0-)5251-64200 Telefax: -8771101
http://lingviko.net/grkg/grkg.htm

Die Zeitschrift erscheint vierteljährlich (März, Juni, September, Dezember). Redaktionsschluß: 1. des vorigen Monats. - Die Bezugsdauer verlängert sich jeweils um ein Jahr, wenn bis zum 1. Dezember keine Abbestellung vorliegt. - Die Zusendung von Manuskripten (gemäß den Richtlinien auf der dritten Umschlagseite) wird an die Schriftleitung erbeten, Bestellungen und Anzeigenaufträge an den Verlag. - Z. Zt. gültige Anzeigenpreisliste auf Anforderung.

La revuo aperadas kvaronjare (marte, junie, septembre, decembre). Redakcia limdato: la 1-a de la antaŭa monato. - La abondaŭro plilongiĝas je unu jaro se ne alvenas malmendo ĝis la unua de decembro. - Bv. sendi manuskriptojn (laŭ la direktivoj sur la tria kovrilpaĝo) al la redakcio, mendojn kaj anoncojn al la eldonejo. - Momente valida anoncprezlisto estas laŭpete sendota.

This journal appears quarterly (every March, Juni, September and December). Editorial deadline is the 1st of the previous month. - The subscription is extended automatically for another year unless cancelled by the 1st of December. - Please send your manuscripts (fulfilling the conditions set our on the third cover page) to the editorial board, subscription orders and advertisements to the publisher. - Current prices for advertisements at request.

La revue est trimestrielle (parution en mars, juin, septembre et décembre). Date limite de la rédaction: le 1er du mois précédent. L'abonnement se prolonge chaque fois d'un an quand une lettre d'annulation n'est pas arrivée le 1er décembre au plus tard. - Veuillez envoyer, s.v.p., vos manuscrits (suivant les indications de l'avant-dernière page) à l'adresse de la rédaction, les abonnements et les demandes d'annonces à celle de l'édition. - Le tarif des annonces en vigueur est envoyé à la demande.

Bezugspreis: Einzelheft 10,-- EUR; Jahresabonnement: 40,-- EUR plus Versandkosten.

© Institut für Kybernetik Berlin & Paderborn
Die in der Zeitschrift veröffentlichten Beiträge sind urheberrechtlich geschützt. Alle Rechte, insb. das der Übersetzung in fremde Sprachen, vorbehalten. Kein Teil dieser Zeitschrift darf ohne volständige Quellenangabe in irgendeiner Form reproduziert werden. Jede im Bereich eines gewerblichen Unternehmens hergestellte oder benützte Kopie dient gewerblichen Zwecken gem. § 54(2) UrhG und verpflichtet zur Gebührenzahlung an die VG WORT, Abteilung Wissenschaft, Goethestr. 49, D-80336 München, von der die einzelnen Zahlungsmodalitäten zu erfragen sind.
Druck: d-Druck GmbH, Stargarder Str. 11, D-33098 Paderborn

grkg / Humankybernetik
Band 53 · Heft 1 (2012)
Akademia Libroservo / IfK



Sara KONNERTH

Sara Konnerth (nask. la 15-an de septembro 1957 en Sibiu) finstudis en 1980 matematikon kaj informadikon en la Fakultato de natursciencoj ĉe la Universitato de Timişoara. Samloke ŝi specialiĝis en analizo dum postuniversitata studado (1980-1981), magistriĝis pri komunikadkibernetiko ĉe AIS San Marino en 2007 kaj doktoriĝis pri kibernetiko kaj ekonomia statistiko ĉe ASE (Academia de Studii Economice) en Bukareŝto en 2010. Ŝi estas eksterorda profesorino de AIS San Marino (ekde 2004) prezidantino de ties rumana sekcio (1994-2006), kaj sekretariino de AIS-Rumanio de 2006 ĝis nun, organizante diversajn sciencajn agadojn (konferencojn, kursojn, prelegojn, studadsesiojn k. s.) kunlabore kun la sibiua universitato.

Konnerth instruis matematikon en ĝenerala lernejo kaj en pedagogia liceo, kie ŝi specialiĝis al metodiko de matematik-instruado kaj realigis koncernajn porinstruistajn kursojn. En 1993 ŝi iĝis docento adjunkta ĉe la Universitato Lucian Blaga en Sibiu (ULBS) kaj du jarojn poste plenrajta docento en la Fakultato de Filologio kaj Arto, Katedro de germanistiko. Ekde 2003 ŝi estas direktorino de la Departemento Akademia Internacia por Sciencrevizio, Universitata Pedagogio kaj Eŭrologio de la Fakultato de Filologio kaj Arto de la ULBS. En 2006 ŝi iĝis plenrajta docento de Departamento por preparado de instruistoj (Departamentul pentru Pregătirea Personalului Didactic) en la ULBS, kie ŝi instruas komputilasistatan instruadon. En 2011 ŝi adapte adoptis sian doktorgradon ĉe AIS San Marino.

Sara Konnerth krome estis komisiisto por sociaj problemoj en la evangelika komunumo de Sibiu kaj ankaŭ politike engaĝita kiel reprezentanto de la germana minoritato en la urbestraro de Sibiu.

Gravaj publikaĵoj:

1. **AIS-Rumanio 10 Jahre,** en *Omaĝlibro: 10 jaroj de klerigkibernetiko en "Lucian Blaga" Universitato Sibiu,* Sibiu 2003, p. 17-24, ISBN 973-86300-9-6.

2. **Eine Fallstudie zum rechnerunterstützten Lehren und Prüfen von Vokabeln**, en: *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft,* Band 46, Heft 3, Akademia Libroservo, Paderborn (Germanio), 2005, p. 138-149.
3. **Procedee de promovare a performanțelor școlare prin lecții virtuale**, en volumo de konferenco *Leadership și management la orizonturile secolului al XXI-lea,* Eldonejo Editura Academiei Forțelor Terestre, Sibiu 2005, p. 257-264.
4. **Economic Aspects of Computer Based Educational Processes**, en volumo de konferenco *Man in the Knowledge Based Organization,* Eldonejo Editura Academiei Forțelor Terestre, Sibiu 2006, p. 14-21, en kunlaboro kun Popa M. Emil, ISBN 973-7809-51-3.
5. **Blended Learning – Instruirea tradițională cu unități virtuale integrate**, en volumo de konferenco *Comunicarea din perspectivă transdisciplinară.* Eldonejo Psihomedia, Sibiu 2007, p. 80-87, en kunaboro kun Popa M. Emil, ISBN 978-973-1753-08-9.
6. **Learning Object Metadata / Descriptori pentru materiale didactice virtuale**, en volumo de konferenco *The Knowledge Based Organisation.* Eldonejo Editura Academiei Forțelor Terestre, Sibiu 2007, p. 117-125, ISBN 978-973-7809-91-9.
7. **Die Realisierbarkeit Internationaler Studien durch virtuelle Studienangebote**, en volumo de konferenco *The Knowledge Based Organisation.* Eldonejo Editura Academiei Forțelor Terestre, Sibiu 2007, p. 127-135, ISSN 1843-6722.
8. **Ĉefaj trajtoj de "Virtuala Universitato"**, en volumo de konferenco УЛОГА И ЗНАЧАЈ НАУКЕ У САВРЕМЕНОМ ДРУШТВУ, Banja Luca 2007, p. 42-53, ISBN 978-99938-894-0-3.
9. **Die "Neue Universität"und die "Generation Internet"**, en volumo de konferenco *The Knowledge Based Organisation,* Eldonejo Editura Academiei Forțelor Terestre, Sibiu 2008, p. 48-54, ISSN 1843-6722.
10. **A Technological Assessment of Linguistic Concepts in the Context of an Artificial Language,** en volumo de „Proceedings" de la konferenco: *Education, Research & Business Technologies.* ASE Publishing House, București 2009, p. 312-318, ISBN 978-606-505-172-2.
11. **O formulă de calcul pentru stabilirea unei limite a rentabilității,** en volumo de konferenco *Creativitate și inovație en învățământ.* Eldonejo Neutrino, Reșița 2009, p. 1192-1200, ISBN 978-973-8916-56-2.
12. **Developing Evaluations by Technological Means,** en volumo de „Proceedings" de la konferenco: *Trends in Engeneering and Academic Education.* Eldonejo Universității „Lucian Blaga" din Sibiu, 2009, p. 15-19, ISBN 1843-2522.
13. **Instruire asistată de calculator. Evoluția instruirii asistate de calculator: curs universitar.** Eldonejo Editura Universității „Lucian Blaga" din Sibiu, 2009 (145 p.), ISBN 978-973-739-917-5.
14. **Exemple de baze de date pentru evaluarea rezultatelor învățării,** en volumo de konferenco: *Creativitate și inovație en învățământul românesc* - ediția II. Eldonejo „Neutrino", Reșița 2010, p. 667-682, en kunlaboro kun Hans-Dietrich Quednau, ISBN: 978-973-8916-82-1.
15. **Variable Assessment Modules in a Computer-Assisted Instruction System,** en „Proceedings" de la konferenco: *Education, Research & Business Technologies.* Eldonejo Editura ASE, București 2011 (6 p.), en kunlaboro kun Constantin-Gelu Apostol, ISSN 2247-1480; ISSN-L 2247-1480.

Modeloj de komputil-asistata taksado

de Sara Konnerth, Sibiu (RU)

el la Universitato Lucian Blaga, Sibiu (RU)

(**Ŝlosilvortoj:** *Komputil-asistata instruado, komputil-asistata taksado, elektronika lernado, instru-matrico, instru-modulo, taksad-modulo, aŭtor-lingvo, sistemo de komputil-asistata instruado (SKAI), sistemo de miksita instruado (SMI), inform-teknologio (IT), miksita lernado, miksita instruado.)*

Enkonduko

La inter- kaj transfakaj okupiĝoj rilate al la problemoj de komputil-asistata instruado (KAI) instigis nin analizi tiun ĉi esplor-kampon, diskuti la studaddirektojn kaj aliĝi al pozicioj, kiuj aperas en la scienca esploro de tiu profilo.

Komenciĝante kun la subskribo de la unua kunlabor-kontrakto inter la *Institut für Kybernetik Paderborn* kaj la Universitato de Sibiu/Hermannstadt (kiu nomiĝas nun Universitatea „Lucian Blaga" din Sibiu) en 1990-05-20 (Mihăescu, 2003, p. 25) ni realigis sub la gvidado de Helmar Frank plurajn eksperimentojn en la kampo de KAI. Pritraktitaj estis precipe aspektoj de **taksado** en la kampo de **komputil-asistata instruado**. La rezultoj de eksperimentoj faritaj en tiu ĉi tereno permesas esprimi konkludojn kaj gravajn asertojn pri la etapo de taksado en la instru-procezo (vidu Konnerth 2010).

Influo de la kibernetika pedagogio kaj psikologiaj tendencoj

Branĉoj de la pedagogio kaj de la psikologio, kiuj influis la disvolvadon de la komputil-asistata instruado kaj influis pere de teoriaj aŭ eksperimentaj metodoj la sciencajn esplorojn sube analizatajn, estas: programita instruado, kibernetika pedagogio kaj informacipsikologio. Ekzemplo en tiu ĉi senco estas la difino kreita de Helmar Frank, kiu indikas precize la ecojn de la programita instruado ("Programmierte Instruktion"), esprimata matematike jene:

(1) $\mathbf{PI} := \mathbf{o} \wedge \mathbf{e} \wedge \mathbf{z} \wedge (\mathbf{s} \vee \mathbf{w} \wedge \mathbf{k})$[1]

kie la simboloj signifas:

- **o** (**O**bjektivierung = enobjektigado)
- **e** (**E**igentätigkeit = propra agado)
- **z** (**Z**eitanpassung = tempadaptiĝo)
- **s** (Skinner) – indikas la aplikon de la „teorio de malgrandaj paŝoj" de **Skinner**
- **w** (**W**eganpassung = vojadaptiĝo)
- **k** (**K**ürzlichkeit = mallongeco).

Tiu ĉi difino de la programita instruado konstituas la fundamenton de la strategioj de realigado de la programoj uzataj en la ekzemploj de komputil-asistata instruado

[1] Frank, Helmar; Meder, Brigitte: *Einführung in die kybernetische Pädagogik.* En: *Kybernetische Pädagogik*, vol. 5, Stuttgart Berlin Köln Mainz 1974 (p. 468).

prezentitaj en tiu ĉi artikolo. Estas postulata la „propra agado" de la lernanto, ĉar la aspekto de propra aktiveco estas unu el la plej gravaj postuloj kaj kondiĉoj de la eklaborado kaj uzado de materialoj de komputil-asistata instruado. Samtempe estas necese apliki ĉiujn variablojn enhavatajn en la formulo (1), ĉar nur la apliko de tiuj postuloj permesas kreadon de materialoj de komputil-asistata instruado kun la necesa kvalita nivelo.

La ĉefaj psikologiaj branĉoj de la 20-a jarcento estis behaviorismo, kognitiva psikologio kaj konstruktiva psikologio, kiuj influis la kampon de la lernteorioj. Psikologia branĉo, kiu naskiĝis post la apero de publikaĵoj de Helmar Frank fine de la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento, estas la informacipsikologio, konata en la scienca literaturo de tiu tempo – speciale en la germanlingva literaturo – kiel precipe kibernetika branĉo de psikologio. Utila por la realigo de esploro estas modelo kreita de la anoj de la informacipsikologio, nomata „informacipsikologia organigramo" (Frank, 1999, p. 41). Tiu modelo proponas specifajn solvojn rilate al la mezurado de la *kvantumo de instruata informacio*, la neceso de *ripetadoj* kaj la denseco de ripetadoj, kaj la *instrurapideco* funkcie de la *lernrapideco.*

Necesas ankaŭ pridiskuti aktualajn aspektojn de la evoluoj en la kampo de utiligo de la komputoro, nome la rapidecon de disvastigo de la informoj pere de la reto kaj la disvolvadon de la tiel-nomata „Ret-Generacio". La interreto povas esti uzata kiel medio de dokumentado ĉie en la mondo. Precipe por la distanc-studado pere de la reto oni ofertas tre multajn bibliografiajn studadmaterialojn. La problemo estas la abundo de nefiltritaj informoj en la reto, kiuj povas kaŭzi provokadon el didaktika vidpunkto.

Unu el la tre gravaj avantaĝoj de la memstara instruado pere de la reto estas la fakto, ke tiu lernado ne dependas de spaco kaj tempo, sed ĝi povas okazi individue, ĉie kaj ĉiam. Grava celo de la moderna instruado estas la disvolvado de la kapacito de la homoj uzi la amaskomunikilojn, kiuj kapabligas la homon organizi sian vivon pere de la novaj teknologioj. La inform-teknologio ofertas novajn eblojn en tiu senco, sed pere de edukad-procezoj devas esti kreataj precipe kompetentecoj labori kun tiuj teknikoj. Tio signifas, ke la profesia kvalifikigo devas esti kontinua edukad-procezo, aktiva, konstruktiviga, realigata pere de memedukado kaj kunlaborado.

La personoj kiuj uzis la komputoron jam en la frua infaneco kiel objekton de kutima uzo kaj por kiuj la interreto reprezentas la plej ĉefan fonton de dokumentado kaj informado, apartenas al la tiel nomata *Ret-Generacio*, kiu, kaŭze de la sekvoj de la globaligado, disvastiĝis en la tuta mondo. La junuloj el la Ret-Generacio alkutimiĝis al la kompleksa oferto de la novaj teknikoj, kreataj pere de multfunkciaj operacioj („multitasking"), rapida transigo de la mesaĝoj, uzado de blogoj, elektronika kopiigo de muziko, video-registrigo kaj elektronikaj ludoj. Tiu ĉi ampleksa oferto bezonas novan analizon kaj adaptigon de la tradiciaj pedagogiaj metodoj ne nur al la utiligo de la novaj teknikaj rimedoj, sed ankaŭ al la formado de konoj kaj lertecoj necesaj por la akirado kaj interagado kun la novaj teknologioj (Konnerth, 2008).

Longtempe la komputil-asistata instruado estis konsiderata kiel alternativo por la rekta tradicia instruado. Intertempe tiu vidpunkto ŝanĝiĝis kaj tiuj du formoj de instruado estas konsiderataj kiel du instru-eblecoj kiuj kompletigas sin reciproke. Kiel

esprimo de tiu kunlaborado estis kreata la nocio „blended learning" („miksita lernado"). Tiamaniere la komputil-asistata instruado estas konsiderata kiel instru-instrumento enhavanta diversigitajn lernofertojn. La avantaĝoj de *blended learning* (Konnerth & Popa, 2007) rezultas el la optimuma kombino de du konceptoj – la koncepto de tradicia instruado kaj tiu de komputil-asistata instruado.

La taksado en komputil-asistata instruado

Ni koncentriĝas al la parto de komputil-asistata instruado ligita al la etapo de taksado de la lernrezultoj. Ni science esploras speciale tiujn aspektojn, ĉar ni ellaboris en tiu ĉi kampo serion de taksad-programoj kiuj estas kontinue uzataj en la didaktika agado de la universitato en Sibiu.

Unue ni analizu la taksad-procezojn kaj la eblecojn plibonigi ilin, uzante taŭgajn soft-produktojn. La komputil-asistata instruado analizas tiujn procezojn de taksado el la klerig-sistemoj kaj klerig-institucioj, kiuj rilatas al la taksado de la rezultoj, al la lernmetodoj, sed ankaŭ al la instrumetodoj. La prijuĝo de la lernejaj rezultoj pere de programoj de komputil-asistata taksado enhavas pedagogiajn aspektojn, ligitajn al la akiro de la celitaj kompetentecoj, sed ankaŭ informadikajn aspektojn, ligitajn al la kreado de programoj, ilia strukturigo kaj efikeco, uzante taŭgajn akireblajn eduk-softojn.

Jam de la komenco de eklaborado de projektoj de enobjektigita instruado – realigataj unue pere de aŭtomataj maŝinoj speciale konstruitaj kun tiu celo – la komponanto de testado okupis gravan rolon, eble eĉ la plej gravan, ĉar tiu asekuras la retrokupladon, necesan por la lernanto, sed ankaŭ por la instruisto. Ni kredas, ke en la estonteco la uzado de la programoj por komputil-asistata taksado devas esti parto de la metodaro de alternativaj taksadeblecoj. Tiu maniero de testado kontribuas al la kreskado de agrableco de la taksado kaj de adaptiĝo de lernantoj al la proceduro de ekzamenado. Estas ankaŭ postulenda la diversigo de la informadikigitaj taksadprogramoj.

Kriterioj, modeloj kaj teknikoj de la taksado

La taksad-instrumentoj devas plenumi plurajn postulojn, kiuj asekuras certan kvalitan nivelon de la taksad-procezo. La ĉefaj de tiuj estas: *objektiveco, valideco kaj fidindeco*. La tradiciaj taksad-metodoj estas: buŝaj provoj, skribaj provoj kaj praktikaj provoj. En la kazo de skribaj provoj la metodo de testado liveras bonan ekvilibron inter la celo, la kvalito kaj la tempo por la eklaborado, kaj ankaŭ pli bona objektiveco en la notigo kompare al aliaj metodoj (Stoica & al., 2001). Tial la testoj estas ofte uzitaj en diversaj formoj de taksado.

La testoj okupas gravan lokon en la komputil-asistata taksado, kiu estas ofte konsiderata identa kun la komputil-asistata testado. Rilate al la terminologiaj diferencoj inter taksad-testoj ni menciu, ke la nocioj de *pedagogia testo de konoj, ekzamen-testo* aŭ simple *testo* estas nur kelkaj nocioj uzataj en la fak-literaturo por difini la instrumenton kaj metodon de taksado, kiu uzas la „eron" (angle „item") kiel specifan elementon, kiu garantias pli grandan objektivecon en la taksado de la lernejaj rezultoj rilate al aliaj metodoj de didaktika taksado (Jinga & al., 1996).

La komputil-asistataj testoj estas objektivaj taksad-testoj, ellaboritaj de instruistoj, orientigitaj al enhavo, uzante la „eron" kiel mezurunuo. Skema difino de la test-ero estas indikita per la sekvanta ekvacio (Stoica & al., 2001):

ero = <demando> + <ties formularo> + <atendata respondo>

En la nuna stato de komputil-asistata taksado oni kreas plej ofte testojn kun objektivaj aŭ semiobjektivaj eroj, kiuj – sinsekve – havas ankaŭ la malavantaĝojn, karakterizajn por tiuj eroj, kiuj estis ofte analizataj en pedagogiaj faklaboraĵoj. Ni analizadis erojn *semiobjektivajn* kun mallonga respondo aŭ kompletiga respondo, ĉar tiu ĉi metodo permesas la taksadon de celoj kun pli granda amplekso ol tiuj kun objektivaj eroj, kiuj estas pli facile programeblaj el informadika vidpunkto.

Nuntempe la taksado ne plu estas konsiderata kiel agado, kiu mezuras nur la rezultojn de la instruado, sed ĝi estas procedo liveranta, krome kaj esence, informojn kaj datenojn rilate al la maniero de ekesto de la procezo, kiu kaŭzis tiujn rezultojn. Ricevinte tiamaniere datenojn kaj informojn rilate al la kvalito de la instru-procezo, oni havas grandan ŝancon eltrovi kaj la pozitivajn elementojn de tiu ĉi procezo, kaj la mankojn aŭ misfunkciadojn, kiuj perturbas ĝin, kaj, sinsekve, oni povas korekti aŭ plibonigi la agadon cele de la optimumigo kaj efikigo de la instru-procezo.

En 1964 Martin Hengst (Hengst, 1964) publikigis artikolon pri la riskoj de apero de eraroj de taksado dum la ekzamenoj, kie oni por la testo hazarde elektas nur parton el la tuto de la instruita materialo. En tiu ĉi artikolo la aŭtoro, surbaze de la rezultoj de matematika statistiko, enkondukas formulon, kiu indikas la probablecon, kun kiu oni obtenas la ĝustan rezulton je la prijuĝo de la konoj de la lernantoj. Li uzas la spertojn de Abraham Wald, publikigitajn en 1944, rilate al sinsekvaj testoj en kiuj n, la nombro de demandoj el la testo, ne estas fiksita je la komenco de la testo. Tiu formo de ekzamenado permesas pli rapidan fiksadon de la ekstremaj valoroj kiuj povas esti obtenataj: la plej granda kaj la plej malgranda noto. Je neklaraj rezultoj de meza nivelo oni devas ekzameni pli longe. Tiu deklaro konstituis instigon por la kreado de komputil-asistata testo, per kiu oni povas sekvi la evoluon de la noto dum la ekzamenado kaj tiamaniere oni povas provi, ĉu la substrekata deklaro estas konfirmata en praktiko (Konnerth, 2005).

La risko de erara prijuĝo dum la ekzamenado estas pli granda, se oni uzas testojn kun elekteblecoj kun pluraj elekteblaj respondoj (*multiple-choice*). Tiuj testoj forigas la subjektivecon de la ekzamenanto, sed kreskas la risko obteni pli bonajn respondojn ol estas la nivelo de la konoj de la lernanto, kaŭze de la ŝanco diveni la ĝustan respondon (Frank & al., 1985).

Gravas ankaŭ la metodo de la modeligo kaj ties apliko en la komputil-asistata instruado. La nocio de *modelo* estas analizenda el la vidpunkto de specialistoj, kiuj studis tiun nocion rilate al iliaj esplorfakoj. La metodo de modeligo estas instrumento de scienca ekkono kaj havas kiel objekton la konstruadon de prezentadoj, kiuj permesu pli bonan komprenon kaj pli profundan sciencan ekkonon de la diversaj fakdirektoj.

Ekzistas pluraj modeloj uzataj nuntempe en la komputil-asistata instruado (SKAI[2], datenbankoj, taksadmoduloj, SMI[3] ktp.)

Por testoj kreataj por esti aplikitaj dum unu parto (leciono) de instru-lern-unuo aŭ por la mezurado de la rezultoj obtenataj de ununura lernanto, ni proponas la sekvontan originalan formulon, kie oni notas kun *S* - la *sukceso de instruado-lernado* – la valoron obtenatan per kalkulo de la jena esprimo:

$$S = (1 - E_d / E_0) * 100\ \%$$

(kie: E_0 = nombro de eraroj en la testo antaŭ la etapo de instruado, E_d = nombro de eraroj en la testo post la instruado)

En sia laboraĵo (Frank, 1993a) Helmar Frank diskutas propran formulon de kalkulo por eltrovi la rentabilitaton de la klerigagado:

I: $a * \text{lerntempo} * [K_A + G + (K_R + 2\,K_L)/g]$ (por tradicia instruado)

II: $a * \text{lerntempo} * [K_A + G + (K_M + K_H)/p] + K_D * \text{lerntempo} * \alpha^{M}_{\Delta}$ (por KAI)


Sen enkalkuli la elspezojn por la la aĉeto de la softo oni konstatas, ke la financa klopodo por la realigado de la komputil-asistata testo rilate al la didaktika-lingvistika projekto: *Enkonduko kaj apliko de la gramatika nocio de difina artikolo en la germana lingvo pere de gramatikaj kaj leksikaj ekzercoj,* aplikita en someraj kamparoj (Ferienlager) en Cisnădioara (Michelsberg) en la jaroj 2004-2008 de Sara Konnerth (Konnerth, 2009a), estis malpli alta ol tiu kalkulita en la kazo de uzado de paperaj lern-folioj. Restas do la demando: kiom granda parto el la kostoj por la aĉeto de la necesa softo devas esti enkalkulita por la kreado de certa projekto de KAI? Ni esprimas ĝeneralan tezon, dirante ke la situacio rilate al la produktad-kostoj de la produktoj de elektronika lernado ankoraŭ ne estas klarigitaj.

Alia diskutebla problemaro estas: ĉu elektronika lernado estas branĉo de elektronika komerco? (Ambrosi, 2002). La teoretikistoj de la elektronika instruado subtenas klopodojn ellabori profitigan ekonomian modelo por e-lernado, pere de transpreno de pluraj konceptoj kaj nocioj el la ekonomika esplorkampo kaj pere de adaptiĝo de tiuj konceptoj al la kampo de elektronika lernado. Tamen estontaj klopodoj de la sciencistoj devas eviti la aplikadon de tro komercaj politikoj en edukprocezoj. La klerigado estas ampleksa kampo, kie ĉiu komponanto devas esti respektita konforme, kaj neniu de ili devas superiri la aliajn.

La modeloj de sistemoj de elektronika taksado

En la ĝenerala arkitekturo de SKAI kutime ne enestas la komponanto „preparo de la didaktika materialo", ĉar tiu ĉi komponanto estas strikte ligita de la kampo de pedagogio kaj ne de informadiko. Ni tamen atribuas grandan atenton ankaŭ al la pedagogiaj aspektoj, kiel prezentas la sekvonta bildo:

[2] Sistemo de Komputil-Asistata Instruado
[3] Sistemo de Miksita Instruado



Bildo 1. Modelo de instrumoduloj kaj taksadmoduloj

La instru-moduloj kaj la taksad-moduloj estas kunligitaj. Antaŭ la instruado okazas etapo de testado, kiu ebligas pli efikajn instru-procedojn. La koncernaj subsistemoj de administrado estas integritaj en la subsistemoj de datenbankoj, nome: la *Subsistemo de administrado de la kursanoj* respektive la *Subsistemo de administrado de la instru-enhavo* estas kunligitaj pere de koncernaj ligoj, tiel ke estu sekurigita kaj la memorigo kaj la retrovo de la enhavoj, kiuj devas esti disvastigitaj funkcie de la specialigo de formado de la kursanoj, same kiel la kreado de raportoj rilate al la obtenataj rezultoj en la edukad-procezo estas realigitaj pere de SKAI. La rezulto de la laboro de la lernantoj kaj de la instruistoj estas raportitaj pere de raportoj kreataj de la SADB (Sistemo de Administrado de la Datenbankoj).

En la modelo de SKAI, kiun ni preferas uzi, la Instru-moduloj kaj la Taksad-moduloj estas kreataj pere de specialaj soft-programoj, kiuj konsistas el sendependaj dosieroj, kiuj povas esti administrataj pere de la datenbanko de la sistemo.

La instru-unuoj kaj la taksad-unuoj, kreitaj kaj aplikitaj dum la praktika aplikado realigita de la aŭtorino, estis kreitaj en la aŭtor-sistemo *Authorware* (http://en.wikipedia.org/wiki/Macromedia_Authorware#History 14.08.2010). Ĉar la rezultoj obtenataj pere de apliko de la taksad-proceduroj estas pli konkludaj ol la aplikoj el aliaj etapoj de la instru-eduka-procezo, oni insistas je *komputil-asistata taksado.*

Oni vidas, ke la varieco de la taksad-strategioj povas esti diversigita pli kaj pli kun la helpo de la novaj taksad-eblecoj, ofertitaj de la programoj de komputil-asistata testado. Konstateblas ke la taksad-strategioj povas esti restriktitaj kaj ne ĉiuj formoj de testado estas permesitaj. Estas ankaŭ menciinda, ke tiuj restriktoj povas esti objektivaj – kaŭzitaj de ekzistantaj sociaj kondiĉoj – aŭ subjektivaj, kiam ili estas kreitaj de iuj personoj kun koncerna aŭtoritato (ministroj, direktoroj de lernejoj, inspektoroj de lernejoj ktp.)

La instru-elementoj estas registritaj en la *Instru-matrico A,* kiu konsistas el nombro de *m Instru-moduloj* MI_i kiuj enhavas po q elementoj (la indekso i indikas la


nombron de la instru-modulo; i = 1,m ; m, i, q estas nenulaj naturaj nombroj). La ĝenerala formo de la instru-matrico estas:

$$A = \begin{bmatrix} a_{11} & a_{12} & \dots & a_{1q} \\ a_{21} & a_{22} & \dots & a_{2q} \\ & \dots & & \\ a_{m1} & a_{m2} & \dots & a_{mq} \end{bmatrix}$$

En ideala kazo, realigebla pere de SKAI (aspekto kutime nerealigebla en tradicia taksado), la Taksad-banko *BE* estas identa kun la Instru-matrico *A*, konsistanta el la samaj elementoj. Sed la elekto de la elementoj por la kreado de taksad-etapo devas esti diversigebla. Ni prezentas ĉi tie kelkajn ekzemplojn de kreado de tiaj taksad-programoj.

Se en la unua taksad-etapo (*ME-R1*) la aplikanto devas trapaŝi ĉiun elementon de la matrico *A*, dum kiu la uzata SKAI registras la obtenatajn rezultojn, la soft-programo ofertas por taksado en la dua etapo nur la erojn, ĉe kiuj la respondo estis malĝusta. En la dua etapo de taksado la nombro de la elementoj de la taksadmatrico (*ME-R2*) estos pli malgranda, ĉar la eroj kun ĝusta respondo estas forigitaj. Pere de tiu proceduro la nombro de eroj el la taksad-banko malkreskas dum la taksad-procezo. Oni kontinuas la taksadon ĝis kiam la matrico *BE* ne plu enhavas elementojn.

Ekzemplo de tia taksad-programo estas la apliko *E-Learning-Aritmetica;* grava parto el tiu programo estas prezentita en la sekvonta bildo:



Bildo 2. Apliko de E-Learnig -Aritmetica

La soft-produkto afiŝas la rezultojn obtenatajn post ĉiu trapaŝo de la taksad-modulo, la diverseco de la longeco de la rektanguloj el la prezentata bildo indikas la nombron de la ripetadoj necesaj por la lernanto. La registriĝo de la matricoj *ME-R* (la tabelo prezentita en la dekstra parto de la supra bildo estas eksportebla al Excel) povas oferti gravan rekupladon al la instru-moduloj, kio faciligas la eblecon trovi la plej malfacilajn

erojn por certa lernanto aŭ por lernantoj ĝenerale, sed ankaŭ la eblecon krei *taksad-raporton*.

Se la instru-matrico estas tre granda, kio ne ebligas, ke je la fina ekzameno la kandidato transiru ĉiujn elementojn de tia ampleksa taksad-banko, tiam la taksad-moduloj aplikataj dum la ekzameno devas esti malegalaj al la instru-moduloj. En tiu ĉi kazo ni proponas alian modelon de ME: Se ĉiu instru-modulo estas ordigita sur linio de la instru-matrico, ni obtenas la jenan strukturon de vektoroj:

$$MI_1 = [\, a_{1\,1};\ a_{1\,2};\ a_{1\,3};\ \ldots;\ a_{1\,q}\,]$$
$$MI_2 = [\, a_{2\,1};\ a_{2\,2};\ a_{2\,3};\ \ldots;\ a_{2\,q}\,]$$
$$MI_3 = [\, a_{3\,1};\ a_{3\,2};\ a_{3\,3};\ \ldots;\ a_{3\,q}\,]$$
$$\ldots$$
$$MI_m = [\, a_{m\,1};\ a_{m\,2};\ a_{m\,3};\ \ldots;\ a_{m\,q}\,]$$

kie $a_{i\,j}$ estas elementoj de instruado
(la indekso *i* indikas la instru-modulon, sed *j* la ordo de la apero de la elemento kadre de la instrumodulo;
i, j, m, q estas naturaj nenulaj nombroj; $i \leq m$, $j \leq q$)

Ni rimarkas ĉi tie, ke la instru-moduloj ne devas havi nepre la saman nombron de komponantoj (do kelkaj de la elementoj $a_{i\,j}$ povas esti nulaj).

La *Banko de taksad-eroj BE* konsistas el la tuto de la elementoj de la *instru-matrico A*; unu ciklo de taksado enhavas almenaŭ unu elementon el ĉiu instru-modulo MI_i, (i = 1,m elektitan hazarde de la komputil-asistata taksad-programo. Sekve *modulo de taksado ME* havos la strukturon:


$$ME = \begin{bmatrix} a_{1\,k(1)} \\ a_{2\,k(2)} \\ a_{3\,k(3)} \\ \ldots \\ a_{m\,k(m)} \end{bmatrix}$$

la elementoj $a_{i\,k(i)} \in MI_i \mid i \in \{1,2, \ldots, m\}$ estas elektitaj hazarde el la korespondaj moduloj laŭ $\forall k(i) \in \{1,2, \ldots, q\}$, evitante la elekton de nulaj elementoj.

La hazarda elekto de la taksad-elementoj el la aro de la *eroj de la taksad-banko* pere de soft-produkto garantias la *objektivecon de la taksad-procezo*. La *valideco de la taksado* estas garantiata de la fakto, ke ne restas instru-modulo neekzamenata.

Ekzemplo de realigado de tia komputil-asistata taksad-programo kun tre granda nombro de eroj estis kreita helpe de la aŭtor-sistemo *Authorware*. La informaci-enhavo elektita por tiu ĉi projekto estis konstruita el la trovo de rumanaj ekvivalentoj al nocioj de la vortaro ILo (Internacia Lingvo de doktoro Esperanto), el baza vortaro konsistanta el 1008 vortoj (42 grupoj kun po 24 vortoj).


La taksad-programo estis kreata tiamaniere, ke la elementoj estu hazarde elektitaj el la tuta banko da eroj kun 1008 elementoj, la taksado okazu cikle, elektante el ĉiu instru-modulo po unu elemento por la kreado de unu taksad-modulo. Tiu proceduro garantias la egalan taksadon de ĉiuj instru-moduloj. La 42 instru-moduloj estas postitaj je sekvencoj en la program-skemo kreata en Authorware (kiel videblas el la du fenestroj de la maldekstra flanko de la bildo 3); la fenestro dekstre montras la pozicion de la eroj a_{1j} en la ciklo ligita al la piktogramo de decido (decision icon) rilate al la instru-modulo MI_1:



Bildo 3. Skemo de instru-moduloj

En la aŭtora lingvaĵo Authorware la taksad-eroj estas elektitaj hazarde el la enhavo de la instru-modulo, uzante la piktogramon „Decision icon" (piktogramo de decido), kiu, pere de la funkcio „Randomly to Unused Path" (hazarde al neuzita vojo), permesas je ĉiu taksad-ciklo elekton de alia ero el la instru-modulo, evitante la ripetadon de la eroj dum unu taksad-etapo, alie oni havus redundajn elementojn en la taksadprogramo.

La publikigo de la programoj de komputil-asistata instruado kaj taksado en la reto estis ebla sur la paĝo de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino je la adreso www.ais-sanmarino.org/kursoj, kie troviĝas la bildo redonita sube (vidu la linion: Vocabular Esperanto-Român (vortoj en la rumana kaj en Esperanto).



Bildo 4. La retpaĝo de AIS San Marino

La eklaborado de la reta oferto de la kurso Esperanto-Rumana estas nur je la komenco. Estonte ni planas publikigi ankaŭ aliajn instru-modulojn en la instruteko de la


Akademio Internacia de la Sciencoj. Estas planita ankaŭ versio de instru-moduloj kun sona redono de la vortoj.

Certe ankaŭ la ordo, en kiu oni aranĝas la instru-modulojn por elekti taksad-elementojn, povas esti hazarda, kiam la instru-moduloj ne estas ordigitaj linie, sed povas esti elektitaj hazarde por la kreado de taksad-modulo *ME*.

Subjekt, sondern die Relation (O → I), welche über die Kategorie O die Relation (M → O) einerseits voraussetzt und andererseits zur vollständigen Zeichenrelation (M → O → I) konkateniert. Dass wir hier statt von einer triadischen von einer tetradischen, um 0 erweiterten, Zeichenrelation ausgegangen sind, verändert diese Verhältnisse in keiner Wiese, da die Nullheit als kategoriales Objekt ja als Null-Relation definiert ist (vgl. Bense 1975, S. 65) und somit aus Gründen seiner „Valenz" die triadisch-trichotomischen Inklusionsverhältnisse der Peirceschen Zeichenrelation in keiner Weise stört. Daraus folgt natürlich, dass das „reale Objekt" der klassischen Metaphysik ein Phantasma bleibt – immerhin ist es jedoch als kategoriales in die triadische Zeichenrelation einbettbar, die dadurch zu einer erweiterten, tetradischen Relation mit unangetasteten semiosischen Relationen wird. Wenn wir uns also im Geiste einer „semiotischen Metaphysik" von der Spekulation der klassichen Metaphysik trennen, dann bleibt die „absolute Existenz" eines Objektes, d. h. sein An-sich eine idealtypische, der semiotisch-logischen Betrachtungsweise dadurch entzogene Vorstellung. Damit beschränkt sich also die Vorgegebenheit der Objekte beim „metaobjektiven" Zeichenprozess auf das Seiende und nicht auf das Sein dieser Objekte. Wir können nur so weit gehen: Im Augenblick, da wir den Rilkeschen Baum oder irgend ein beliebiges Objekt betrachten, so erscheint es uns bereits als subjektives Objekt, denn wir machen uns ja ein Bild von ihm – und zwar, dies ist eine sehr wichtige Konsequenz, noch bevor wir uns in einem intentionalen Akt entscheiden, dieses Objekt zum Zeichen zu erklären. Damit gibt es wenigstens für uns keine absoluten Objekte, aber Objekte haben, indem wir sie in ihrer „Existenz" überhaupt wahrnehmen, bereits präsemiotische Relevanz im Sinne der durch das kategoriale Objekt erweiterten Zeichenrelation. Die semiotische Metaphysik löst das An-sich der klassischen Metaphysik durch die Präsemiotik ab.

Schrifttum

Bense, Max: *Semiotik*. Baden-Baden 1967
Bense, Max: *Semiotische Prozesse und Systeme*. Baden-Baden 1975
Bense, Max/Walther, Elisabeth: *Wörterbuch der Semiotik*. Köln 1973
Panizza, Oskar: *Der Illusionismus und Die Rettung der Persönlichkeit*. Leipzig 1895
Rilke, Rainer Maria: *Die Gedichte*, hrsg. von Ernst Zinn. Frankfurt am Main 1997
Toth, Alfred: *Semiotische Strukturen und Prozesse*. Klagenfurt 2008
Walther, Elisabeth: *Allgemeine Zeichenlehre*. 2. Aufl. Stuttgart 1979

Eingegangen 2011 –11–18
Anschrift des Verfassers: Prof. Dr. Alfred Toth, 8225 East Speedway, Apt. 1013, Tucson, AZ 85710, USA

The Translation of the Things (Summary)
A semiotical metaphysics, as outlined in the present essay, will have to substitute classical metaphysics by a presemiotics based on an operation by aid of which the categorical object is embedded into the Peircean triadic sign-relation.

grkg / Humankybernetik
Band 53 · Heft 1 (2012)
Akademia Libroservo / IfK

Komputlingvoscienca kaj logika analizado de matematikaj tekstoj

de Marcos CRAMER, Bonn (D)

1. La matematika faklingvo

Per la esprimo *matematika faklingvo* ni celas la lingvaĵon de universitat-nivelaj matematikaj lernolibroj kaj de publikigaĵoj en matermatikaj fakrevuoj, kaj per la esprimo *matematikaj tekstoj* ni celas ajnajn tekstojn skribitajn en la matematika faklingvo. Unuavide matematikaj tekstoj impresas pro la multeco de formuloj aperantaj en ili. Tamen estas ankaŭ multaj naturlingvaj elementoj en matematikaj tekstoj, kiuj obeas la kutimajn gramatikajn regulojn de la lingvo de la teksto. Sube estas ekzemplo de matematika teksto el Matthias (1995, paĝo 19).

Oni povas distingi du specojn de enhavo en matematika teksto:

- La *matematika enhavo*, kiu temas pri la matematikaj objektoj (nombroj, funkcioj, vektoroj, aroj, korpoj, grupoj, topologiaj spacoj ktp.) kaj iliaj matematikaj ecoj kaj rilatoj (esti para/nepara, esti derivaĵo de, esti subaro de, ktp.).
- La *metamatematika enhavo*, ekzemple informoj pri tio, por kio utilas iu difino aŭ teoremo, informoj pri tio, kiu unuafoje pruvis iun teoremon, kaj klarigoj pri tio, kial iu pruvmetodo estas uzata aŭ ne uzata en certa situacio.

Por la resto de ĉi tiu artikolo nin interesas nur la matematika enhavo de matematikaj tekstoj.

4.4 Interŝanĝo de bazaj vektoroj

Teoremo 4.4.1 *Estu* $w_1,\dots,w_s$ *lineare sendependaj vektororj el vektorspaco V kun bazo* $\{v_1,\dots,v_n\}$. *Tiam ni povas elekti el la vektoroj* $v_1,\dots,v_n$ *vektorojn* $v'_1,\cdots,v'_m$ *tiel, ke ankaŭ* $\{w_1,\dots,w_s,v'_1,\dots,v'_m\}$ *estas bazo de V.*

Pruvo. Konsideru ĉiujn subarojn de $M = \{w_1,\dots,w_s,v_1,\dots,v_n\}$, kiuj entenas $M_1 = \{w_1,\dots,w_s\}$ kaj estas generantaroj de V. Almenaŭ M mem havas tiujn ĉi ecojn. Elektu tian subaron kun minimuma nombro de vektoroj: $M_2 = \{w_1,\dots,w_s,v'_1,\dots,v'_m\}$. Ni nun montras per nerekta pruvo, ke M_2 estras lineare sendependa, kio pruvas la teoremon. Se M_2 estus lineare dependa, ni havus $\lambda_1,\dots,\lambda_s,\mu_1,\dots,\mu_m \in K$, kiuj ne ĉiuj estas nuloj, tiel ke

$$\lambda_1 w_1 + \dots + \lambda_s w_s + \mu_1 v'_1 + \dots + \mu_m v'_1 = 0$$

Nun ekzistas iu $i \in \{1,\dots,m\}$ kun $\mu_i \neq 0$, ĉar alikaze $\{w_1,\dots,w_s\}$ estus lineare dependa. Tio signifas, ke ne nur $\mu_i v'_i \in \mathrm{Lin}\ \{w_1,\dots,w_s,v'_1,\dots,v'_{i-1},v'_{i+1},\dots,v'_m\}$, sed eĉ $v'_i \in \mathrm{Lin}\{w_1,\dots,w_s,v'_1,\dots,v'_{i-1},v'_{i+1},\dots,v'_m\}$. Tio estas kontraŭdiro al la minimumeco de M_2, ĉar ankaŭ $M_2 \setminus \{v'_i\}$ havas la deziratajn ecojn. □

Matematikaj tekstoj kutime estas dividitaj en certajn partojn, kiuj strukturas la tekston, ekzemple en aksiomojn, difinojn, teoremojn, helpasertojn (ankaŭ nomatajn *lemoj)* kaj pruvojn. Ofte – precipe en pli altnivelaj tekstoj – la aksiomoj kaj difinoj bezonataj por la pruvoj estas parte ellasataj, ĉar ili apartenas al la fona scio de la koncerna subfako de la matematiko. Por la logika analizado de matematikaj tekstoj nin tamen interesas ĉefe tekstoj, kiuj estas logike fermitaj en si mem, do kies pruvoj dependas nur de aksiomoj kaj difinoj prezentitaj en la teksto mem.

Matematikaj tekstoj apartiĝas de aliaj tekstospecoj per apartaj specialaj ecoj: Kiel jam menciite, matematikaj tekstoj kombinas naturlingvajn esprimojn kun matematikaj simboloj kaj formuloj. Aldone, oni evitas malfacile interpreteblajn plursencajn frazojn. Unu maniero por eviti plursencecon estas la uzo de matematikaj simboloj, ekzemple pere de variantoj *(x, y, z* kaj simile) anstataŭ anaforaj pronomoj ("ĝi", "tio" kaj simile).

Oni povas enkonduki iun supozon, kaj pli poste en la teksto retiri tiun supozon. Jen ekzemplo de tio el Matthias (1995) (la graslitere markita supozo estas retirata fine de la pruvo, do ne plu uzebla poste):

> $\{u_1,\ldots,u_m,w_{r+1},\ldots,w_n\}$ estas lineare sendependa:
> **Ni supozu, ke ekzistas** $\lambda_1,\ldots,\lambda_m,\mu_{r+1},\ldots,\mu_n \in K$ tiel ke
> $\lambda_1u_1+\cdots+\lambda_mu_m+\mu_{r+1}w_{r+1}+\cdots+\mu_nw_n=0$
> Tiam $v:=\lambda_{1u1}+\cdots+\lambda_mu_m=-\mu_{r+1}w_{r+1}-\cdots-\mu_nw_n$. Sekve
> $v\in U\cap W$. Nun $v\in Lin\{v_1,\ldots,v_r\}$ kaj $v\in Lin\{w_{r+1},\ldots,w_n\}$.
> Ĉar $\{v_1,\ldots,v_r,w_{r+1},\ldots,w_n\}$ estas lineare sendependa, ni konkludas ke $v=0$. Ĉar $\{u_1,\ldots,u_m\}$ kaj $\{w_{r+1},\ldots,w_n\}$ estas lineare sendependaj aroj (la lasta pro Rimarko 4.3.3), ni ricevas
> $\lambda_1=\cdots=\lambda_m=\mu_r+1=\cdots=\mu_n=0.$ □

Matematikaj tekstoj estas tre strukturitaj: Je malloka nivelo, ili estas dividitaj en tekstoblokojn, ekzemple en aksiomojn, difinojn, teoremojn kaj pruvojn. Ene de pruvo, supozoj povas esti inigitaj en aliaj supozoj, tiel ke la validecregionoj de la supozoj difinas hierarĥian pruvo-strukturon.

Jen kelkaj pluaj specialaj ecoj de matematikaj tekstoj:

- Difinoj aldonas novajn simbolojn kaj esprimojn al la vortaro kaj fiksas iliajn signifojn.
- En pruvo, ĉiu aserto devas logike sekvi el aksiomoj, difinoj kaj antaŭe pruvitaj asertoj.
- La paŝoj de pruvo estas ofte pravigitaj per resendo al rezultoj el aliaj tekstoj aŭ el pli fruaj partoj de la sama teksto.

1.1 Formala kaj duonformala matematiko

Ene de la matematiko, ekzistas la subfako *formala matematiko*, kiu okupiĝas pri formalaj pruvoj skribitaj en formalaj lingvoj. *Formalaj lingvoj* kutime konsistas nur el formuloj, kaj tute evitas plursencecon. En *formala pruvo* ĉiu paŝo de la pruvo devas

sekvi el la antaŭaj paŝoj per klare difinitaj sintaksaj reguloj, tiel ke oni povas aŭtomate kontroli, ĉu iu formala pruvo estas senerara aŭ ne. Kutime matematikistoj ne prezentas siajn pruvojn en ĉi tia formala maniero, sed *duonformale* per la matematika faklingvo prezentita antaŭe. Por tio ekzistas diversaj kialoj, interalie la jenaj:

- Teksto en formala lingvo kutime estas malfacile legebla.
- En formala lingvo oni ne povas sin esprimi libere, sed nur laŭ malmultaj antaŭdifinitaj modeloj.
- Formalaj pruvoj kutime estas tede detalaj kaj longegaj, tiel ke oni pro la multaj detaloj pretervidas la esencon.

Jen ekzemple de formala pruvo:

Γ	$\neg(\varphi \rightarrow \neg\psi)$				(1)
Γ	$\neg\varphi$	$\neg\varphi$		supozregulo	(2)
Γ	$\neg\varphi$	φ	φ	supozregulo	(3)
Γ	$\neg\varphi$	φ	$\neg\varphi$	(2) + monotoneco	(4)
Γ	$\neg\varphi$	φ	$\bot$	(3,4) + $\bot$-enigo	(5)
Γ	$\neg\varphi$	φ	$\neg\neg\psi$ $\bot$	(5) + monotoneco	(6)
Γ	$\neg\varphi$	φ	$\neg\psi$	(6) + $\bot$-eligo	(7)
Γ	$\neg\varphi$	$\varphi \rightarrow \neg\psi$		(7) + $\rightarrow$-enigo	(8)
Γ	$\neg\varphi$	$\neg(\varphi \rightarrow \neg\psi)$		(1) + monotoneco	(9)
Γ	$\neg\varphi$	$\bot$		(8,9) + $\bot$-enigo	(10)
Γ	φ			(10) + $\bot$-eligo	(11)

2. La projekto Naproche

La projekto *Naproche* estas komuna projekto de la universitatoj de Bonn kaj Duisburg-Essen en Germanujo, kiu studas la matematikan faklingvon. Ĝia ĉefa celo estas la evoluigo de *reguligita lingvo* por matematikaj tekstoj (Cramer et al., 2010) kaj realigo de komputila programo, kiu povas aŭtomate transformi la tekstojn en tiu reguligita lingvo en samvalorajn formulojn de kutima predikata logiko per metodoj de la komputa lingvoscienco, kaj per tiuj formuloj kaj helpe de aŭtomataj teorem-pruviloj kontroli la logikan senerarecon de la teksto (Kühlwein et al., 2009).

Reguligita lingvo estas subaro de natura lingvo, kies vortprovizo kaj gramatiko estas limigitaj por eviti plursencecon kaj tiel ebligi ĝian logikan traktadon fare de koumputilo. Momente la projekto koncentriĝas pri la anglalingva matematika faklingvo.

Ni celas ĉefe al du eblaj uz-kampoj de la Naproche-programo:

- Ĝia uzo en universitat-nivela instruado de matematiko: Studentoj povus ekzerci sin per skribado de pruvoj en la reguligita lingvo de Naproche, kaj la programo tiam povus aŭtomate kontroli la ĝustecon de la pruvo.
- Ĝia uzo por alproksimigi la formalan matematikon al la neformala matematiko: Pruvoj en la reguligita lingvo de Naproche povas esti konsiderataj formalaj pruvoj, ĉar ili estas aŭtomate kontroleblaj, sed samtempe ili estas facile legeblaj kaj similaj al kutimaj matematikaj tekstoj.

Por kamparo de kutima matematika pruvo, formala pruvo kaj pruvo en Naproche, ni montras tri versiojn de la pruvo ke $\sqrt{2}$ estas neracia nombro.

Kiel ekzemplon de kutima matematika pruvo, mi citas el Hardy kaj Wright (1938):

If $\sqrt{2}$ is rational, then the equation $a^2 = 2b^2$ is soluble in integers *a, b* with *(a, b)* = 1. Hence a^2 is even, and therefore *a* is even. If $a = 2c$, then $4c^2 = 2b^2$, $2c^2 = b^2$, and *b* is also even, contrary to the hypothesis that *(a, b)* = 1.

Jen parto de la ĉi-supra pruvo en la programlingveca formala lingvo Mizar el la Universitato de Bjalistoko (Wiedijk, 2006):

```
theorem
  sqrt 2 is irrational
proof
  assume sqrt 2 is rational;
  then consider i being Integer, n being Nat such that
  W1: n <> 0 and
  W2: sqrt 2=i/n and
  W3: for i1 being Integer, n1 being Nat st n1<> 0
    & sqrt 2=i1/n1 holds n<=n1 by RAT_1:25;
  A5: i=sqrt 2*n by W1, XCMPLX_1:88, W2;
  C:  sqrt 2>=0 & n>0 by W1, NAT_1:19, SQUARE_1:93;
      then i>=0 by A5, REAL_2:121;
      then reconsider m = 1 as Nat by INT_1:16;
```

Kaj fine, la sama pruvo en la reguligita lingvo de Naproche:

Theorem. $\sqrt{2}$ is irrational.

Proof.

Assume that $\sqrt{2}$ is rational. Then there are integers *a, b* such that $a^2 = 2 \cdot b^2$ and *gcd* (*a, b*) = 1. Hence a^2 is even, and therefore *a* is even. So there is an integer *c* such that $a = 2 \cdot c$. Then $4 \cdot c^2 = 2 \cdot b^2, 2 \cdot c^2 = b^2$, and *b* is even. Contradiction. Qed.

2.1 Malfaciloj ĉe logikigo de natura lingvo


La tradukado de natura lingvo al logikaj formuloj alportas diversajn malfacilaĵojn. Unu en la fakliteraturo de la lingvoscienca logiko tre fama ekzemplo de tia malfacilaĵo estas la tiel nomataj *azeno-frazoj*:

Iu kamparano posedas azenon.	⇝	$\exists x\, \exists y$ (*kamparano*(x) ∧ azeno(y) ∧ *posedas* (x,y))
So iu kaparano posedas azenon, li batas ĝin.	⇝	$\forall x\, \forall y$ ((*kamparano*(x) ∧ azeno(y) ∧*posedas* (x,y)) → batas (x,y))

Nedifinitaj substantivoj (en Esperanto esprimitaj per antaŭmeto de "iu" aŭ simple per forlaso de la difina artikolo) kutime estas tradukataj helpe de ekzisto-kvantigilo (∃), kiel en la unua ekzemplo. Tamen en la dua ekzemplo ili devas esti tradukataj per universalaj kvantigiloj (∀). Do kvankam la unua frazo estas subfrazo de la dua frazo, en la logika formulo kiu reprezentas la enhavon de la dua frazo, oni ne trovas subformulon kiu reprezentas la enhavon de la unua formulo. Tio alportas malfacilaĵojn al la aŭtomata tradukado de natura lingvo al logikaj formuloj.

Por solvi ĉi tiajn problemojn, la nederlanda lingvisto Hans Kamp disvolvis la *Diskurs-Reprezentan Teorion*, en kiu oni tradukas tekstojn unue en *Diskurs-Reprezentajn Strukturojn,* kiujn oni poste povas plutraduki en kutimajn logikajn formulojn (Kamp kaj Reyle, 1993) Diskurs-reprezentaj strukturoj estas logikaj strukturoj kiuj havas precize la saman esprimpovon kiel kutimaj predikat-logikaj formuloj kaj estas facile intertradukeblaj kun logikaj formuloj, sed reprezentas la logikan enhavon en maniero pli simila al la natura lingvo, tiel ke ne estiĝas tiaj problemoj kiel kun la azeno-frazoj.


Oni kutime bildigas diskurs-reprenzentajn strukturojn per kesta strukturo. Jen la diskurs-reprezenta strukturo de la dua azeno-frazo:



La kesto maldekstre de la signo ⇒ estas la diskurs-reprezenta strukturo de la unua azeno-frazo. Do ĉe la diskurs-reprezentaj strukturoj ni ja havas la dezirindan econ, ke logika traduko de subfrazo estas sama kiel se tiu subfrazo estas memstara frazo.

2.2 Pruv-reprezentaj strukturoj

Por bone redoni la specialaĵojn de la matematika faklingvo, ni kreis apartan variaĵon de la diskurs-reprezentaj strukturoj, kiujn ni nomas *Pruv-Reprezentaj Struktoroj*. Jen kelkaj el la specialaĵoj de pruv-reprezentaj strukturoj:



- Ili bone reprezentas la strukturajn ecojn de matematika teksto, do ĝian dividon en aksiomoj, difinoj, teoremoj, pruvoj, ktp., kaj la hierarĥian strukturiĝon de la pruvoj per enkonduko kaj retiro de supozoj.
- Ili ebligas distingon inter variantoj enkundukitaj malimplicite en la matematika teksto (kiel *a, b* kaj *c* en la pruvo der la neracieco de $\sqrt{2}$), kaj variantoj enkonduktitaj implicite en la traduko de natura lingvo al logiko (kiel *x* kaj *y* en la logika traduko de la azeno-frazoj)
- Ili havas apartajn markilojn por resendoj al antaŭaj rezultoj uzataj kiel pravigoj por pruvpaŝoj.

Supre de la paĝo troveblas ekzemplo de pruv-reprezenta strukturo, nome mallongigita versio de la pruv-reprezenta strukturo de la pruvo ke $\sqrt{2}$ estas neracia nombro.

2.3 La logika kontrolado

Por kontroli la logikan senerarecon de pruvoj, ni uzas *aŭtomatajn teorem-pruvilojn*. Aŭtomata teorem-pruvilo estas komputila programo, al kiu oni povas doni logikan problemon en la formo de listo de formuloj uzotaj kiel aksiomoj kaj unu formulo nomata *konjekto*, kiun la sistemo provu pruvi surbaze de tiuj aksiomoj. Estas tri eblaj eligoj ĉe aŭtomata teorem-pruvilo.

- *Pruvita:* Tio signifas ke la programo sukcesis pruvi ke la konjekto logike sekvas el la aksiomoj.
- *Kontraŭekzemplo trovita*: Tio signifas, ke la programo sukcesis trovi kontraŭekzemplon, kiu montras ke la konjekto ne sekvas logike el la aksiomoj.
- *Eltempiĝo*: Tio signifas, ke la teorem-pruvilo trovis nek pruvon nek kontraŭezemplon en la tempo, kiun oni donis al ĝi por la serĉado.

Post la kreo de pruv-reprezenta strukturo surbaze de matematika teksto en nia reguligita lingvo, tiu strukturo estas transdonita al la logik-kontrolilo por kontrolado de ĝia logika senerareco. La logik-kontrolilo trairas la pruv-reprezentan strukturon paŝon post paŝo, kaj ĉe ĉiu paŝo tenas en la memoro liston de logikaj formuloj, nomataj *antaŭkondiĉoj*, kiuj reprezentas la ĝis tiam kolektitan matematikan scion. Ĉe ĉiu parto de pruv-reprezenta strukturo, kiu reprezentas novan aserton en pruvo, la logik-kontrolilo sendas al aŭtomata teorem-pruvilo logikan problemon, kies konjekto estas tiu aserto kaj kies aksimoj estas la ĝis tiam kolektitaj antaŭkondiĉoj. La tuta pruvo estas rekonata kiel senerara se ĉe ĉiuj problemoj tiel senditaj al teorem-pruvilo, ĝia eligo estis "pruvita".

3. Apartaj problemoj

3.1 Analizado de matematikaj formuloj

La lingvo de matematikaj formuloj mem estas nekredeble riĉa lingvo, daŭre riĉigata pere de difinoj. Oni devas klare distingi la kutiman lingvon de matematikaj formuloj, kiu estas neformala lingvo, kaj la formulo-lingvon de difinita logika sistemo, kiu ĉiam

estas formala lingvo. La sintaksa analizado de matematikaj formuloj estas tre malfacila tasko.

Konsideru ekzemple la simplan formulan esprimon $a(x+y)$. Se a estas nomo de iu funkcio, tiam oni devas analizi tiun formulon kiel la valoron de tiu funkcio ĉe $x + y$. Se a same kiel x kaj y estas nombro, tiam oni devas analizi tiun formulon kiel produkton de a kaj $x + y$. Do la sintaksa analizado de matematikaj formuloj dependas de informoj, kiuj estis donitaj antaŭe en la teksto, eble per naturlingva esprimo. Kontentiga solvo al ĉi tiaj problemoj estas la plej nova rezulto de mia laboro ĉe Naproche, kies realigo en la programo ankoraŭ ne estas finita.

3.2 Kunigaj kaj disigaj interpretoj de multenombro

Substantivoj en multenombro povas havi kunigan aŭ disigan interpreton: Ekzemple, la frazo "Tri viroj portis pianon" povas aŭ signifi ke tri viroj kune portis pianon (en unusola porto-ago), aŭ ke estis tri apartaj porto-agoj, ĉiu kun alia viro portanta pianon. La unua nomiĝas *kuniga interpreto* kaj la dua *disiga interpreto* de la multenombro.

En matematiko ekzistas kaj kunige kaj disige interpretendaj uzoj de la multenombro: Ekzemple, la frazo "La linioj l kaj M estas paralelaj" estas interpretenda kunige, dum la frazo "2 kaj 3 estas primoj" estas interpretenda disige. Tamen en matematiko apenaŭ aperas uzoj de multenombro kiuj estas kaj kunige kaj disige interpreteblaj kaj tial dusencaj. Mi disvolvis algoritmon por Naproche, kiu decidas, ĉu iu uzo de multenombro estas interpretenda kunige aŭ disige (Cramer kaj Schröder, 2011). La rezulto de ĉi tiu algoritmo preskaŭ ĉiam koincidas kun la natura interpreto de la multenombro.

4. Rezultoj

Ni tradukis diversajn matematikajn tekstojn al nia reguligita lingvo, kaj kontrolis ilin per nia programo: Nia ĉefa testo-teksto estas la verko "Grundlagen der Analysis" ("Fundamentoj de la analizo"), de kiu ni tradukis kaj sukcese kontroligis ĝis nun unu kaj duonan ĉapitrojn.

Ni ankaŭ elprovis nian sistemon ĉe la klasika verko "Elementoj" de Eŭklido. Liaj pruvoj ofte dependas de geometria intuicio. Por havi logike senmankajn pruvojn, oni devas aldoni multajn aksiomojn. Sed tiam, pro la multeco de la aksiomoj, la aŭtomataj teorem-pruviloj en multaj okazoj havas malfacilaĵon trovi solvojn al la problemoj senditaj al ili. Tial la logika kontrolado de la Elementoj per nia programo ankoraŭ funkcias nur por etaj fragmentoj de ĝi.

Aldone ni havas diversajn mallongajn testo-tekstojn, ekzemple pri aroteorio kaj grupteorio.

5. Konkludo

La matematika faklingvo havas interesajn ecojn, kiuj apartigas la komputlingvosciencan analizadon de matematikaj tekstoj disde aliaj uzoj de la komputa lingvoscienco. Kadre de la projekto Naproche ni evoluigis (kaj pluevoluigas) reguligitan version de matematika faklingvo (angla). Nia programo Naproche povas analizi tekstojn

en tiu reguligita lingvo per komputlingvosciencaj metodoj kaj kontroli ilian logikan senerarecon helpe de aŭtomataj teorem-pruviloj.

Literaturo

Cramer, Marcos, B. Fissen, P. Koepke, D. Kühlwein, B. Schröder, kaj J. Veldman (2010): *The Naproche Projekt – Controlled Natural Language Proof Checking of Mathematical Texts,* LNAI 5972, prelegkolekto de la seminario CNL 2009.

Cramer, Marcos kaj B. Schröder (2012): *Interpreting Plurals in the Naproche CNL,* LNAI 7175, prelegkolekto de la seminario CNL 2010.

Godrey, Hardy kaj E. Wright (1938): *An Introduction to the Theory of Numbers,* Oxford University Press

Kamp, Hans kaj U. Reyle (1993): *From Discourse to Logic: Introduction to Modeltheoretic Semantics of Natural Language.* Kluwer Academic Publisher

Kühlwein, Daniel, M. Cramer. P. Koepke kaj B. Schröder (2009): *The Naproche System.* Nur rete pulikigita kontribuo al la konferenco Calculemus

Ulrich, Matthias (1995): *Fundamentoj de lineara algebro,* propra eldono, Neckerhausen

Wiedij, Freek (2006): *The Seventeen Provers of the World,* Springer, New York

Ricevite: 2011-12-12

La originalo de tiu ĉi artikolo aperis en:

Nosková, Katarína kaj P. Baláž (red.) (2011): *Modernaj teknologioj por Esperanto.* Prelegkolekto de la Konferenco "Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" (KAEST) 2010. ESPERO, Partizánske

Adreso de la aŭtoro: Marcos Cramer, Elsa-Brändtström-Straße 57, D- 53227 Bonn
cramer@math.uni-bonn.de, http:///www.naproche.de

Computational linguistic and logical analysis of mathematical texts (Summary)

We present the Naproche project, which studies the language of mathematics and aims at creating a computer program that can analyze mathematical texts using methods from computational linguistics and check them for logical correctness. The language of mathematics as found in journals and textbooks has distinctive features: It consists of a mixture of formulae and natural language elements. The language is enriched constantly through the use of definitions, which add new words and new symbols with precisely defined meanings. The main parts of mathematical texts are mathematical proofs, in which every assertion has to logically follow from previously known assertions. We compare such features with the features of general language, and show how they influence the creation of the program we are aiming at.

Genial & Geheim - Alan Turing in 10 Etappen. Ausstellung im Heinz-Nixdorf- MuseumsForum Paderborn, 11. Januar bis 16. Dezember 2012

Das Jahr 2012 steht im Zeichen von Alan Turing. Der legendäre englische Mathematiker und Computerpionier wurde am 23. Juni 1912 in London geboren. Sein 100. Geburtstag wird vor allem in seinem Mutterland, aber auch in zahlreichen anderen Ländern mit Veranstaltungen gefeiert.

In Deutschland wird das Heinz Nixdorf MuseumsForum in Paderborn mit der Ausstellung „Genial & Geheim - Alan Turing in 10 Etappen" die Leistungen des genialen Wissenschaftlers würdigen. Original-Exponate sowie innovative und künstlerische Installationen präsentieren den Museumsbesuchern Alan Turings herausragende Leistungen.

Seine Forschungen haben während des 2. Weltkrieges zur Entzifferung der mit der Enigma verschlüsselten deutschen Funksprüche geführt. Damit spielte Turing eine wichtige Rolle bei der Atlantikschlacht und anderen wichtigen Kriegsschauplätzen. Ebenso bedeutend waren seine theoretischen Arbeiten, die bis heute die Grundlagen der Informatik bilden. Während seine Zeitgenossen den Computer „nur" als große Rechenmaschine im Kopf hatten, konzipierte Turing bereits das Modell einer universellen Maschine, die alle algorithmischen Probleme berechnen konnte.

Die Ausstellung im Heinz Nixdorf MuseumsForum konzentriert sich auf die Leistungen Turings bei der Enigma-Entschlüsselung und seine grundlegenden Arbeiten als Computerpionier, beleuchtet aber auch seine Ausführungen zur Künstlichen Intelligenz und zur Musterbildung in der Natur.

Die Ausstellung ist in Etappen aufgebaut. In monatlich aufeinanderfolgenden Inszenierungen werden zehn Themen dargestellt. Ausstellungseröffnung war im Januar 2012 mit dem Themenbereich „Enigma und die Atlantikschlacht". Im Februar folgte der nächste Abschnitt mit Objekten und Darstellungen zu den „Codebrechern von Bletchley Park", der englischen Zentrale für Kryptographie im 2. Weltkrieg. Die weiteren Themen werden ebenfalls etwa einen Monat lang gezeigt, bis zum Ausstellungsende am 16. Dezember 2012.

Alan Turing (1912-1954)

Alan Turing wurde am 23. Juni 1912 in London geboren. Von 1931 bis 1934 studierte er am King's College in Cambridge Mathematik und wurde dort 1935 zum „Fellow" gewählt. Während des Zweiten Weltkrieges arbeitete er in der „Government Code and Cypher School" in Bletchley Park und entwickelte Verfahren zur Dechiffrierung der mit der Enigma verschlüsselten deutschen Funksprüche.

Nach dem Ende des Krieges wandte sich Turing der Computerentwicklung zu und war am National Physical Laboratory in Teddington (1945 - 1947), wo er das Konzept der „Automatic Computing Engine" (ACE) entwarf, und als stellvertretender Direktor des „Computing Laboratory" an der Universität Manchester (ab 1948) tätig. 1952 wurde er wegen seiner Homosexualität zu einer Hormonbehandlung verurteilt. Ein Jahr nach Ende der Behandlung, am 7. Juni 1954, beging er Selbstmord.

Alan Turing hat die Erfindung des Computers in den 1940er und 1950er Jahren zwar nicht maßgeblich beeinflusst, aber seine theoretischen Konzepte ließen ihn in die Computergeschichte eingehen: Die „Turingmaschine" ist noch heute eine wichtige Grundlage für Untersuchungen in der theoretischen Informatik und der 1950 von ihm zur Beantwortung der Frage „Können Maschinen denken?" vorgeschlagene „Turingtest" stimulierte die Entwicklung der künstlichen Intelligenz. US-Präsident Barack Obama stellte bei seinem jüngsten Staatsbesuch in London Turing in eine Reihe mit Newton, Darwin und Einstein.

http://www.hnf.de/Sonderausstellung/Foyerausstellungen/Turing/Turing.asp

Konferenco „Interlingvistiko kaj identeco“

Oktobre, 28. – 30. 2011, okazis en Tartua Universitato la internacia konferenco "ЛИНГВОКУЛЬТУРНОЕ ПРОСТРАНСТВО СОВРЕМЕННОЙ ЕВРОПЫ ЧЕРЕЗ ПРИЗМУ МАЛЫХ И БОЛЬШИХ ЯЗЫКОВ" ('Lingvokulturejo de la nuntempa Eŭropo prisme de malgrandaj kaj grandaj lingvoj'), omaĝe al la 70-jariĝo de profesoro Aleksandr D. Duliĉenko, slavisto kaj interlingvisto, aŭtoro de la ampleksa enciklopedia libro „Internaciaj helplingvoj“, Tallinn 1990.

Same enhavriĉa estis la internacia scienca aranĝo „Language and Identity Symposium" gvide de la rektora konsilistino Virve-Anneli Vihman oktobre, 20. – 22. 2011; *http://www.ut.ee/international/events/language-and-identity-symposium/programme.*

Pro diversaj kaŭzoj Estona Interlingvistika Asocio (EIA) aranĝos la interlingvistikan parton **„Interlingvistiko kaj identeco“** de la oktobra lingvokultureja konferenco **paralele kun la 48-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj** (BET-48, 04. – 08. 07. 2012, en Tartu, Pala kaj la kastelo Alatskivi; *www.perereisid.ee/est/bet48/*, Tiel ebliĝos ankaŭ (a) paroli-aŭskulti pri la 125-jara Esperanto-movado kaj 90-jariĝo de Esperanto-Asocio de Estonio, (b) konatiĝi kun la Estona kulturo (poetoj Anna Haava kaj Juhan Liiv, komponisto Eduard Tubin k.a.) kaj Baltgermana kulturoj, (c) ripozi ĉe la lago Peipus

EIA dissendos baldaŭ Informilon 1 pri la konferenco „Interlingvistiko kaj identeco“. Kiel pasintkonference ni aperigos la 10-an studaron „Interlinguistica Tartuensis“. Same kiel en 2005 kaj 2009 okazos honorado de meritaj interlingvistoj kun la honorpremio "Academicus Ariste". Mondaj kandidatoj estas bonvenaj. Krome estos eldonota la 6-a almanako „Cejano“ de la Tartua Esperanto-Societo. Informoj ĉe:

Madis Linnamägi, estrarano de EIA
GSM +372 5098647, forsel@hot.ee

Rete aperis dulingvaj konferencaj aktoj

Boĵidar Leonov (red.): *Internacia simpozio "Apliko de Esperanto en la profesia agado", Karlovo 2011.* Eldonis AIS Bulgario, Karlovo 2011. 88 p. ISSN 1314-5177. Aperis sub *http://www.slideshare.net/aepa-esperanto*

Enhavo:

1. Ataŭparolo de EProf. Boĵidar Leonov
2. EProf. Boĵidar Leonov: La rolo de la ekologia scienco en la nuntempa mondo
3. AProf. Renato Corsetti: Lernu vian lingvon per lernado de alia lingvo: Esperanto kaj lingva konscio
4. OProf. Reinhard Fössmeier: Profesia aplikado de Vikipedio
5. Doc. Valitova Ju. O., Doc. Goluŝkina N. N., Doc. Ivanov A. Ju.: Modelo por la eduka agado en la universitato
6. Deĵan Puŝkarov, direktoro de la Nacia Agentejo por Profesia Agado Bulgario: Sistemo de profesia edukado en Bulgario. Bazaj prioritatoj.
7. Doc. Dr. Marina Nikolova: LEADER – la maniero revivigi la vilaĝan ekonomion
8. Doc. Dr. Marina Nikolova: La kompleksa agroturisma produkto – eblecoj por diversataka evoluo de la agrara ekonomio
9. Pavlin Pavlov: Energiproduktado el planta biomaso – perspektiva formo de entreprenado en la kondiĉoj de daŭra evoluo
10. Dr. Giancarlo Fighiera: La arto organizi kongreson

La aktojn eldonis la Bulgara Sekcio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, la eldono estas dulingva bulgara-Esperanta. La tradukojn faris Mariana Evlogieva.

Krom en la reta formo, la eldonisto planas ankaŭ libran publikigon, por kiu estas serĉataj sponzoroj. Bonvolu kontakti:

EProf. Boĵidar Leonov, prezidanto de AIS Bulgario , leonov@rozabg.com

Oficialaj Sciigoj de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino
Fondita en la Respubliko de San Marino
Prezidanto: OProf. Hans Michael Maitzen, Inst. f. Astronomie, Türkenschanzstr. 17, A-1180 Wien
Informofico: OProf. R. Fössmeier, informo@ais-sanmarino.org, www.ais-sanmarino.org
Konto: 2051-305 Postbank Hannover (BLZ 250 100 30)
Redakcia respondeco: OProf. Dr.habil. Reinhard Fössmeier Finredaktita: 2012-02-23

Einladung zur ordentlichen Mitgliederversammlung der AIS

– Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. (vormals AIS Deutschland e. V.) am Sonntag, dem 15. April 2012, 13:00 – 14:00 Uhr, bei Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München. Um Anmeldung an diese Adresse oder per Netzpost an informo@ais-sanmarino.org wird gebeten. Sollte die Teilnehmerzahl für den Veranstaltungsort zu groß sein, wird die Versammlung auf 14:00 Uhr an einem anderen Ort vertagt, der am ursprünglichen Ort bekannt gegeben wird. Wegen Erkrankung des amtierenden Vorsitzenden, OProf. Dr. habil. Helmar Frank, erfolgt die Einladung durch den Stellvertreter OProf. Wickström.

Tagesordnung:

1. Formalien (Beschlussfähigkeit, Stimmrecht, Protokoll, Tagesordnung)
2. Allgemeiner Bericht des Vorstandes
3. Kassenbericht, Entlastung, Wirtschaftsplan 2012
4. Beschlussfassung über Anträge des Vorstandes
5. Entscheidung über Anträge aus TOP 1
6. Neuwahl des Vorstandes für die Amtsperiode 2012–2015
7. Verschiedenes

Berlin, 2012-02-03
OProf. Bengt-Arne Wickström

Invito al membrarkunveno de AIS

- Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. je dimanĉo, 2012-04-15, 13:00 – 14:00 horoj, ĉe Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München (Germanio). Ni petas pri sinanonco al tiu adreso aŭ retpoŝte al informo@ais-sanmarino.org. Se aliĝos tro da partoprenantoj por la planita kunvenejo, la kunveno prokrastiĝos al 14:00 kaj okazos en alia loko, indikota en la planita loko. Pro malsano de la oficanta prezidanto, OProf. Dr. habil. Helmar Frank, invitas lia anstataŭanto OProf. Wickström.

Tagordo:

1. Formalaĵoj (kvorumeco, voĉdonrajto, protokolo, tagordo)
2. Ĝenerala raporto de la estraro
3. Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto 2012
4. Decidoj pri proponoj de la estraro
5. Decidoj pri proponoj el tagordero 1
6. Elekto de la estraro 2012–2015
7. Diversaĵoj

Berlin, 2012-02-03
OProf. Bengt-Arne Wickström

Invito al kunveno de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro

de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Ĉar la lasta kunveno dum SUS 32 en Sibiu ne povis decidi pri aprobo de la buĝeto kaj senŝarĝigo de la malnova estraro, la senato invitas al plia kunveno kadre de la membrar-kunveno de la germana AIS-asocio (AIS/IAW). La kunvenejo kaj la proponita tagordo estas identaj al tiuj de la "membrarkunveno de AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften" (vidu la koncernan invitilon), escepte de la elektoj, kiuj ne koncernas la ĜA.

Vieno, 2012-02-03
OProf. Hans Michael Maitzen,
prezidanto de AIS

Richtlinien für die Kompuskriptabfassung

Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 2001 auch Artikel in allen vier anderen Arbeitssprachen der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino, also in Internacia Lingvo (ILo), Englisch, Französisch und Italienisch. Bevorzugt werden zweisprachige Beiträge – in ILo und einer der genannten Nationalsprachen - von maximal 14 Druckseiten (ca. 42.000 Anschlägen) Länge. Einsprachige Artikel erscheinen in Deutsch, ILo oder Englisch bis zu einem Umfang von 10 Druckseiten (ca. 30.000 Anschlägen) in 14-pt Schrift. In Ausnahmefällen können bei Bezahlung einer Mehrseitengebühr auch längere (einsprachige oder zweisprachige) Texte veröffentlicht werden.

Das verwendete Schrifttum ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluss des Beitrags zusammenzustellen – verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b", usf. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und Erscheinungsjahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenartikel werden - nach dem Titel - vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. – Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem, Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – **Bevorzugt werden Beiträge, die auf früher in dieser Zeitschrift erschienene Beiträge anderer Autoren Bezug nehmen.**

Graphiken (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) und auch Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu nummerieren und nur so im Text zu erwähnen. Formeln sind zu nummerieren.

Den Schluss des Beitrags bilden die Anschrift des Verfassers und ein Knapptext (500 – 1.500 Anschläge einschließlich Titelübersetzung). Dieser ist in mindestens einer der Sprachen Deutsch, Englisch und ILo, die nicht für den Haupttext verwendet wurde, abzufassen.

Die Beiträge werden in unmittelbar rezensierbarer Form erbeten. Artikel, die erst nach erheblicher formaler, sprachlicher oder inhaltlicher Überarbeitung veröffentlichungsreif wären, werden in der Regel ohne Auflistung aller Mängel zurückgewiesen.

Direktivoj por la pretigo de kompuskriptoj

Krom germanlingvaj tekstoj aperas ekde 2001 ankaŭ artikoloj en ĉiuj kvar aliaj laborlingvoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, do en Internacia Lingvo (ILo), la Angla, la Franca kaj la Itala. Estas preferataj dulingvaj kontribuaĵoj – en ILo kaj en unu el la menciitaj naciaj lingvoj – maksimume 14 prespaĝojn (ĉ. 42.000 tajpsignojn) longaj. Unulingvaj artikoloj aperadas en la Germana, en ILo aŭ en la Angla en amplekso ĝis 10 prespaĝoj (ĉ. 30.000 tajpsignoj) en 14-pt skribgrandeco. En esceptaj kazoj eblas publikigi ankaŭ pli longajn tekstojn (unulingvajn aŭ dulingvajn) post pago de ekscespaĝa kotizo.

La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo; en kazo de samjareco aldonu „a", „b", ktp. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De monografioj estu – poste – indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj la jaro de la apero kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - **Preferataj estas kontribuaĵoj, kiuj referencas al kontribuaĵoj de aliaj aŭtoroj aperintaj pli frue en ĉi tiu revuo.**

Grafikaĵojn (kiuj estas havigendaj laŭeble kiel presoriginaloj) kaj ankaŭ tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii en la teksto nur tiel. Formuloj estas numerendaj.

La finon de la kontribuaĵo konstituas la adreso de la aŭtoro kaj resumo (500 – 1.500 tajpsignoj inkluzive tradukon de la titolo). Ĉi tiu estas vortigenda en minimume unu el la lingvoj Germana, Angla kaj ILo, kiu ne estas uzata por la ĉefteksto.

La kontribuaĵoj estas petataj en senpere recenzebla formo. Se artikolo estus publicinda maljam post ampleksa prilaborado formala, lingva aŭ enhava, ĝi estos normale rifuzata sen surlistigo de ĉiuj mankoj.

Regulations concerning the preparation of compuscripts

In addition to texts in German appear from 2001 onwards also articles in each four other working languages of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino, namely in Internacia Lingvo (ILo), English, French and Italian. Articles in two languages – in ILo and one of the mentioned national languages – with a length of not more than 14 printed pages (about 42.000 type-strokes) will be preferred. Monolingual articles appear in German, ILo or English with not more than 10 printed pages (about 30.000 type-strokes) in 14-pt types. Exceptionally also longer texts (in one or two languages) will be published, if a page charge has been paid.

Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors (abbreviated if necessary) should be indicated. Monographs should be named along with place and year of publication and publisher, if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – **Preferred will be texts, which refer to articles of other authors earlier published in this journal.**

Graphics (fit for printing) and also tables should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. and should be referred to as such in the text. Mathematical formulae should be numbered.

The end of the text should form the author's address and a resumee (500 – 1.500 type-strokes including translation of the title) in at least one of the languages German, ILo and English, which is not used for the main text.

The articles are requested in a form which can immediately be submitted for review. If an article would be ready for publication only after much revising work of form, language or content, it will be in normal case refused without listing of all deficiencies.